1-a Jaro, N.ro 15 APERAS SEMAJNE 8. Januaro 1925

ESPERANTO je la servo S.A.T. de la tutmonda PROLETARO

SENNACIULO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

La abonprezaro kaj reklamtarifo troviĝas sur la lasta paĝo — Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas. — Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia organo, kaj se oni sendas al la Red. du ekz. de la gazeto enhavanta la koncernan represaĵon. — Ponumera prezo: 0,05 dol.

Redaktoro: N. BARTHELMESS, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY, 24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

La ĉina popolo kaj Sovet-Rusio

Pri Ĉinio dum lastaj monatoj plej multaj sciigoj trapasis la ĉiulandan gazetaron. La lukto de la imperialistaj potencoj por ekspluato de la nekapitalista, duonkolonia regnego, la kontraŭaj interesoj de la konkurantoj pro la rabaĵo, devas veki plej grandan intereson en proletaj rondoj, des pli ke la ĉina popolo ŝajne komencas ekkompreni sian situacion kaj serĉas apogon je sia natura amiko, la amiko de ĉiuj sklavigitoj, Sovet-Rusio. Ĝis kia grado progresis la interproksimiĝo de ambaŭ regnegoj, estas bone ilustrita en sekvanta artikolo, kiun ni ĉerpis el la juda gazeto "Der Schtern" (La stelo). Red

En la proleta revolucia preso estis lastatempe aperigita artikolo de la ĉina laborist-agulo Tang-ŝin-Tŝu pri la kapitalistaj intervenoj en Ĉinio komencante meze de 19a jarcento. Interalie estas tre interesa kaj notinda la rilato de la ĉina popolo al la rusa revolucio:

"La ĉina popolo aŭdis pri la liberiĝo de la rusa proletaro, ĝi aŭdis kiel Lenin klarigis, ke neniigitaj estos ĉiuj traktatoj, kiujn la cara Rusio devigis al Ĉinio; la popolo ĉina aŭdis, ke la 3a Internacio alvokis ĉiujn subpremitajn popolojn al la batalo kontraŭ la imperialismo. Per tio la ĉina popolo ekvidis, ke Sovet-Rusio estas ĝia amiko, ke nur ĉi-lando povos helpi ĝin liberiĝi el la katenoj. Kiam venis Ĉinion la rusa diplomato Karaĥan, la ĉina popolo ne volis allasi, ke li forveturu reen ne interliginte amikajn traktatojn inter ambaŭ popoloj. Kiam li transiris la ĉinan limon, estis aranĝitaj en ĉiu urbo kiun li vizitis, amikaj manifestacioj por Sovet-Rusio. Kiam Karaĥan alvenis Pekin'on estis aranĝita ĉe la stacidomo, manifestacio, en kiu partoprenis laboristoj, studantoj kaj profesoroj, partoprenis 10 mil homoj. Eĉ pli frue organiziĝis "Societoj de rusaj amikoj". Ĉi-societoj adresis al Karaĥan multe da salut-telegramoj, samtempe estis sendataj multaj avertaj leteroj al la Pekina registaro, en kiuj la popolo esprimis la deziron, ke oni tuj interrilatu kun Sovet-Rusio kaj dank' al ĉi-trudo la registaro estis devigata interrilati kun Karaĥan. De la alia flanko la ĉina registaro estis influita de la imperialismaj registaroj, ke oni ne komencu interrilati kun Sovet-Rusio. Per tio la ĉina popolo estis tiel ĉagrenita, ke estis organizitaj protest-demonstracioj en ĉiuj urboj, kaj aparte en Pekin. Preskaŭ ĉiutage okazis interbataloj de la laboristoj kaj studantoj kun la polico. Finfine la Pekin'a registaro estis devigata interrilati kun Sovet-Rusio sed ne per sia propra volo, nur per la deziro kaj premo de la popolo. La ĉina popolo ne nur unufoje esprimis sian simpation al Sovet-Rusio. Kiam k.do Lenin mortis, oni aranĝis en ĉiu urbo, kie ajn estas industrio aŭ gimnazio, funebrajn manifestaciojn. En suda Ĉinio, en Kanton kie estas aparta registaro de Sun-jat-sen, la registaro publike partoprenis la publikajn funebrajn ceremoniojn. En Tĉekiang (Meza Ĉinio) estas starigita monumento de Lenin. Krom tio la instruista unuiĝo decidis, ke en ĉiu popola lernejo devas pendi la bildo de Lenin. En Pekin, kie la eŭropa imperalismo estas kvazaŭ ĉe si hejme, estas starigita en la Centra Parko monumento je memoro de Lenin. Trad. *Vivulo.*

El Mongolio

Nuna sendependa Mongolio [1]) okupas mezon de Azio kaj areas ĉirkaŭ 1 500 000 kv. kilometrojn laŭ la plej nova karto de Korostovcev kaj Kotviĉ. La areo iom superas tiun de Britio, Francio kaj Germanio ensume prenitaj, sed havas ne pli ol 800 000 loĝ. Loĝantaro de urboj en Mongolio okupas ĉirkaŭ 22 % de tuta loĝantaro de l'lando. La plej granda urbo de Mongolio *Urga* havas ĉirkaŭ 100 000 loĝantojn kaj estas miksaĵo de Oriento kun Okcidento: mongolaj feltdomoj, telegrafoj, telefonoj, ordinaraj eŭropaj (rusaj) domoj, palacoj de mongolaj princoj kaj sufiĉe imponaj temploj de lamaistoj. Kameloj kaj aŭtomobiloj.

La urbo ludas en Mongolio tre gravan ekonomian kaj kulturan rolon. Mongoloj plejparte estas nomadoj — brutistoj. Industrio nun preskaŭ forestas. Same terkulturo embrias (nur 50 000 hektaroj en tuta lando). Sed mongoloj komprenis kaŭzojn de sia senprogreso kaj gvidataj de nova reformema registaro ili penas reorganizi sian ekonomian vivon. Oni devas diri, ke Mongolio havas ŝancojn por disvolvi industrion ĉar ĝiaj montoj tenas grandan provizon de minaĵoj diversspecaj (karbo, kupro, oro, plumbo, fero, asbesto, grafito ktp.). Krom tio oni povas intensigi brutedukadon. Terkulturo ne povas flori pro ĝenerala manko de akvo. Nun mongoloj estas malriĉa popolo. Laŭ prof. *Majskij* unu loĝanto de Mongolio havas 461 rublojn da nacia havaĵo, 137 rublojn da nacia enspezo, 135 rublojn da nacia elspezo kaj nur 2 rublojn da libera kontanto. Post rusa revolucio mongoloj kun sukceso batalas kontraŭ feŭdismo. Mi jam komunikis, ke en somero mortis ilia "surtera dio" (monarĥo) kaj nun Mongolio estas sendependa Respubliko, gvidata de reformema registaro, starigita de potenca popola partio. Nun estas elektita tutmongolia "granda kunveno (ĥuruldan)" laŭ demokratiaj principoj. kiuj garantias malinfluon de reakciaj feŭdanoj kaj eklezio, Ĉi-kunveno denun fariĝas plej alta potenco en la lando

---

1) Ni jam sciigis, ke parto de Mongolio aliĝis Sovet-Union. *Red.*

kaj ĵus kunvenis en Urga. Plej gravaj taskoj de "Ĥuruldan" estas reorganizi ekonomian vivon de Mongolio, administradon kaj financojn. Ĝi firmigos sendependecon de Respubliko kaj atingojn de liberiga movado. En Ĥuruldan estas reprezentitaj ŝtataj oficistoj kaj eklezianoj, sed ili estas relative malmultaj kaj sendube ne sukcesos revivigi por ĉiam mortintan dion sian. La organizado de elektoj en ĉi-lando senvoja, sabloza kaj montoza, kun prahistoriaj komunikiloj, kun eterne migranta elektantaro estis neimageble malfacila. Sed ĉiuj malhelpoj estis venkitaj, kaj nun mongoloj trovis veran vojon de l'tuthomara kulturo kaj neniom povas esti timigilo por Eŭropo. *Maksim Krjukov.*

OKCIDENTEN!

Kanado, la nova "El Dorado"

La granda milito rezultigis plifortiĝon de Wall Street [1]) kaj la relativan malplifortiĝon de Lombard Street [2]). Do, kompreneble, la defalo de brita imperialismo devigis "la nacion de butikistoj", elpensi rimedojn por subteni la falantan Imperion. Ekstariĝis la fiorganizaĵo *Federation of British Industries* [3]), kaj la energioj de diversaj organizaĵoj direktis sin, por fari la Imperion memstara.

Hejme la britaj regantoj kontraŭis seriozan situacion. Milionoj da senlaboruloj kriege postulis laboron — tondroj de ribeloj sonis ĉie. Sav-eliron oni nepre deviş tuj trovi. Kaj kie pli bone ol en la "ora okcidento"? Britio havas 482 personojn, dum la "dominiono" nur 2½ en kvadrata mejlo. Jen do la solvo!

Aldone, la pograndskala "dumpingo" de britaj laboristoj en Kanadon helpus haltigi la altiĝantan tajdon de amerika imperialismo. Do, la britaj regantoj unuvoĉe alvokis "Okcidenten iru!"

Sed la kapitalistoj de Kanado troviĝas nun en serioza situacio. La granda milito postlasis testamenton de impostaro, kiu pendas kiel muelŝtono ĉirkaŭ iliaj koloj. La procentaĵaj kostoj nur rilate la nacian ŝuldon sumiĝas po 16 dolaroj por ĉiu loĝanto. Plue, la registaraj elspezoj atingas antaŭe ne atenditajn nivelojn. Sekve iĝis pli kaj pli malfacile funkcii sub la kreskanta ŝarĝo. Multaj okcidentaj urboj bankrotis; bienoj transiris en manojn de registaraj aŭtoritatoj, ĉar la posedantoj ne povis pagi la impostojn, Do, tra la lando oni postulis grandan plimalaltigon de impostoj, kaj nepre ŝparemon en registaraj ĉirkaŭaĵoj. Krom terura imposta ŝarĝo la dungantoj estis minacataj de granda konkurado de ĉiuj flankoj. La malaltaj vivrimedaj normoj de eŭropa laboristaro ebligis, ke la eŭropaj kapitalistoj, malgraŭ altaj importaj tarifoj, povis "dumpi" siajn malmultekostajn varojn en Kanadon. Do, oni ne miru, ke la kapitalistoj de Kanado laŭte blekis por *plimalaltigata impostaro kaj pli da loĝantoj.* Ili deziris rompi la normojn de vivado de la laboristoj kaj regajni sian perditan superecon *per la kostopago de la industriaj kaj agrikulturaj laboristoj.* Kaj, kiel pli efike ol per la pomulta enmigrado de malkara laborvaro el Eŭropo?

En ĉi-afero la interesoj de la kanadaj kapitalistoj ne koincidis kun tiuj de la bankaj moŝtuloj de Lombard Street, kiuj deziras, ke Kanado ricevu nur pure britan genton. Aliflanke . . . tio ne taŭgas por la kanadaj dungantoj — ili deziras miksaĵon de rasoj, kaj *babelon de lingvoj, por ke ili povu kontraŭigi unu rason kontraŭ alia* kaj tiamaniere apartigi la fortojn de organizita laboristaro en Kanado.

Ne eraru — la lavango de enmigrado en la "oran okcidenton" signifas nepre tranĉadon de salajroj, malplialtigon de vivad-normoj de kanadaj laboristoj kaj farmistoj, kaj helpon al kanadaj kapitalistoj por eliri el la truo de bankroto per kostpago de la laborantaj masoj. La ĉefa bankestro de Kanado diris: "La kaŭzo de ĉi-tiuj anomalioj de altaj prezoj estas ankoraŭ precipe la kosto de laboro. *Senlaboreco estas la natura alĝustigilo,* kvankam peniga kaj bedaŭrinda." Kiel pli bone la dungantoj povus malplialtigi salajrojn ol per inundo de jam tro-plenigita laborista merkato per kreskantaj nombroj de laboristoj — *parolantaj multajn lingvojn?*

La agentoj ofertas Kanadon kiel "landon taŭgan por loĝejo de Reĝidoj". Jen la faktoj: — 94% el la farmoj estas hipotekitaj, dum la ŝuldaro de la okcidentaj farmistoj estas pli ol 1 000 000 000 000 [4]) dolaroj. En ŝtato de Saskaĉeŭan (ofte nomita la pankorbo de la Imperio) la ŝuldaro ĉe la mez-grada farmo estas 5000 dolaroj. En tri kamparaj distriktoj nure 180 000 akreoj da tero estis forprenataj por ŝuldo de impostoj.

„Suna Alberta" prezentas bildon ne pli bonan . . . Dekmiloj da farmistoj devis forlasi la farmojn senespere ŝuldante. Eĉ la "herooj de hieraŭ" [5]) ne evitas tiajn spertojn. Kampanaraj lernejoj devas fermiĝi, ĉar la terkulturistoj ne povas pagi la impostojn. Plue, la sorto de la farmistoj ĉiam plimalboniĝas. "Tondilo" efikas sur la kanadan farmiston pli ol sur iun alilandulon. En dek jaroj, la prezoj de industriaj produktaĵoj plialtiĝis po 116%, dum tiuj de agrikulturaj produktaĵoj plimalaltiĝis.

Kaj la sorto de la industria laboristo estas neniom pli bona. Dekmiloj da senlaboruloj plenigaĉas la urbajn stratojn, vane serĉante laboron. En Toronto sole estas ne malpli ol 10 000 nedungitaj sklavoj.

Tiom malbonaj estas la kondiĉoj, ke multnombraj laboristoj transmigras en Usonon: en 1922, 62 289, en 1923, 181 973, kaj dum la 6 monatoj ĝis junio 1924, 96 835. Ni sciiĝas, ke 2 000 kanadaj fabrikejoj fermiĝis; al 75 000 teksistoj mankas laboro; la ŝtal-muelejoj de Nova Skoŝa fermiĝis; la ligna industrio de l'okcidento spertis sian plej malbonan someran sezonon; la ministoj de Alberta strikas (depost aprilo 1a), dum iliaj kunlaborantoj de l'oriento "ĝuis" unu tagon da laboro en semajno; konstru-laboristoj estas multe subnormigitaj; la grandega papera industrio malrapidiĝis unuafoje dum multe da jaroj — jen la situacio kiu kontraŭstaras la laboristojn de Kanado, kaj kiu estas plene plimalbonigata per la enveno de dekmiloj da novaj loĝantoj.

Sed la fantaziaj rakontoj pri la fabela riĉeco de Kanado ankoraŭ altiras la nesciantajn laboristojn de Britio. Multfoje la konservativa Kanada Sindikata Kongreso akceptis rezoluciojn kiuj signis la enmigrajn planojn kiel kontraŭ-laboristaj, kaj ties Kunsido en Vinipeg konsekvence postulis la ĉiaman ekstertenon de orientaj laboristoj, kies normo de vivado estas tiom malalta, ke ĝi minacas ĉiam tiun de la tuta laboristaro.

Sed la Kongreso faris malmulton por organizi la nedungitojn. Lokaj konsilantaroj en diversaj urboj, kaj poste Nacia Konsilantaro de Senlaboruloj estis starigataj, kies ĉefa demando estas "laboro, aŭ plena alimento laŭ sindikataj salajr-valoroj". La Komunista Partio nun entreprenas tiun Nacian Konsilantaron, kun perspektivo de pli bona sukceso. Kaj ja ekzistas bezono por tia organizaĵo, ĉar la Kanada Ministrejo de Laboro asertis, ke la Registaro akceptas respondecon por enmigrado, sed ne por senlaboreco!

Tamen la Registaro estis devigata agi, spite siaj protestoj, ĉar lokaj aŭtoritatuloj bombardis ĝin per postuloj kaj petoj por helpo, ĝis la Registaro de Otava devis kunvenigi Nacian Konferencon pri Senlaboreco.

Sed la "malferm-laboreja" [6]) dungantaro ege malŝatas ĉi-tiun elmontron de malforteco, ĉar ĝi difektas por britaj laboristoj la roz-koloran bildon de Kanado kiel "lando taŭga por enloĝado de herooj".

Trad. de E. K. L. el la angla de H. M. Bartholomew, en "The Communist Review".

1) Ĉefa financa strato de Nuark.
2) Ĉefa financa strato de London.
3) Federacio de britaj industrioj.
4) Unu biliono.
5) militintoj.
6) Laborejo malfermita por ricevi ne-sindikatulojn.

Internacia atako kontraŭ la 8-hora labortago kaj sociala leĝdonado

Ne estas mirinde, ke la laŭleĝa enkonduko de l'8-hora labortago, kiel entute la klopodo de la laboristaro, akiri socialpolitikajn progresojn per internaciaj kontraktoj aŭ per laŭlandaj atakoj, kaŭzas ĉagrenon en la vicoj de l'internacia kapitalistaro. Se oni legas la informojn de l'sindikata internacionalo pri la diversaj konferencoj de diversfakaj industriistoj, oni vidas, kiel konsekvence ili procedas por faligi la 8-horan labortagon kaj por malprosperigi la elkonstruon de socialpolitika leĝdonado. Ili ne preterlasas okazon, precizigi ilian starpunkton kontraŭ la 8-hora labortago kaj averti la aŭtoritatojn pri la ruinigo de la industrioj per la socialpolitiko.

El *Aŭstrio* ni scias, ke la atako de la metalindustriistoj kontraŭ la 8-hora labortago estis ĉefa kaŭzo de striko de metallaboristoj en septembro 1924. Ankaŭ la minejposedantoj atakis la 8-horan labortagon, kaj nur la solidareco de l'tuta laboristaro malebligis endanĝerigon de l'koncerna leĝo.

El *Francio* ni aŭdis, ke la ĝenerala kunveno de la teksaĵfabrikistoj postulis, ke estu pli intensigata la produktado kaj ke la sociala asekuro estu enkondukata nur paŝo post paŝo laŭ spertoj kaj deziroj, faritaj en industriaj kaj komercaj rondoj. La unuiĝo por industrio kaj agrikulturo atentigas, ke la nuna reguligo de l'8-hora labortago signifas malfavorigon kompare al la alilandaj konkurantoj. La grafikaj entreprenistoj pro la mizera financstato de la lando konsideras maltaŭga la tempon, enkonduki la proponitan socialasekuron. Ili kompreneble ankaŭ estas kontraŭ la deviga dungo de militinvalidoj.

En *Italio* la unuiĝo de l'industriistoj deklaras, ne konsenti kun la ĝeneraligo de l'8-hora labortago kaj esprimas la deziron, ke la internacia porlabora leĝdonado estu endigita tiel, ke ĝi ne ĝenu la produktadon italan.

La centra unuiĝo de labordonantoj en *Svisio* postulas, ke la ordinara laborsemajno laŭ la koncerna leĝo estu plilongigata ĝis 52 horoj.

La centra unuiĝo por industrio, minekspluato, komerco kaj financo en *Polio* deziras ĝeneralan ŝanĝon de la ekzistantaj leĝoj pri labortempo, libertempo kaj festotagoj.

En *Rumanio*, kiu lando kulminacias en subpremado de porlaboristaj progresoj, la unuiĝo de l'fabrikistoj postulis, ke porlaborista leĝdonado estu rezulto de libera interkonsento inter labordonantoj kaj laborprenantoj, sen enmikso de la ŝtato. Precipe tiu lasta kondiĉo enkondukas nin en la pensmanieron de tiuj sinjoroj. Ni povas imagi, kiel "amike" ili interkonsentas kun laboristoj pri porlaborista leĝdonado, se ili maldeziras la enmikson eĉ de tiu ege reakcia registaro.

Tre reakcie ankaŭ kondutas la unuiĝo de labordonantoj en *Danio*, postulante, ke la uzingvidado sole apartenu al la entreprenistoj kaj avertante la leĝdonantajn korporaciojn, la labortempon reguligi per leĝo.

Ankaŭ en *Germanio*, kie preskaŭ 45 procentoj de la laboristaro laboras pli longe ol 48 horojn posemajne, la industriistoj ĉiam denove deklaras, ke la 8-hora labortago ne estas tolerebla, ĉar proksimume unu sesono de la produktaĵoj devas esti oferata por la riparpagoj kaj ke ili nur pro memdefendo estas kontraŭuloj de Vaŝingtona kontrakto pri la 8-hora labortago.

Tiuj kompreneble ne estas ĉiuj decidoj de la kapitalistoj almilitantaj la 8-horan labortagon kaj la socialpolitikan leĝdonadon. Sed tiuj provoj jam sufiĉas por montri al ni, ke la internacia kapitalistaro bontaktike atakas tiujn akiraĵojn de la laboristaro. Jen tie, jen tie ili provas malantaŭenpuŝi siajn dungitojn kaj truigi la ekzistantajn leĝojn, ĝis fine tiuj partaj atakoj konduku al la sola celo: nuligi kaj malebligi la aplikon de socialaj leĝoj je la bono de la laboruloj. La laboristaro denove estu je ilia sola dispono, la teruraĵoj de l'kapitalista ekonomiordo trafu la laborsklavojn per la tuta pezego, ke ili denove estu la senvolaj iloj, ke ilia sorto plene dependu de la bontrovo de l'kapitalistoj. Estas devo de ĉiuj laboristaj organizaĵoj en ĉiuj landoj, ĝisprofunde kontraŭbatali la kapitalistajn intencojn kaj defendi la malmultajn akiraĵojn per ĉiuj fortoj. Se la internacia laboristaro malsukcesos, tiam terure pligrandiĝos ĝia "riparpago" por la moloĥo kapitalismo. *1484, Wien.*

La virinoj en industrio kaj profunuiĝoj

Post la unua malpligrandiĝo de l'nombro de laborulinoj dum la demobilizo en la plejparto de landoj, ĝi nun denove ekkreskis. En Germanio en la nuna tempo la nombro de dungitaj laborulinoj estas multe pli alta ol en 1913. En ĉi-jaro en ĉiuj entreprenoj kontrolataj de la fabrika inspekto estis nur 1592138 laborulinoj t. e. 21,6% de l'tuta nombro de laborulinoj ĝenerale kaj en la jaro 1922 ilia nombro estis 2019189 aŭ 24% de l'okupitaj en la produktado.

Laŭ la statistiko de malsanulejkasoj en 1919 (ne kalkulante la ekmalsaniĝintojn) je 100% socie asekuritaj membroj estis 30,7% da virinoj kaj en 1924 — 35,3%. Sed en Anglio kiel komunikas "Economist" la nombro de laborulinoj post la milito konstante malpligrandiĝis. En 1922 la nombro de okupitaj en la produkto virinoj nur iomete superis 3 milionojn, dum nelonge antaŭ la interpaco ĝi estis 7000000. Sed la aserto ke la virina laboro malpliiĝadis ankaŭ post 1922 estas bazita nur sur la statistiko de l'membreco ĉe profunuiĝoj kaj tial estas tute nepruvita.

En Svisio en la periodo de 1910 ĝis 1920 la kresko de l'virina laboro estis pli intensa ol tiu de l'viroj. En la lasta raporto de l'fabrika inspekto por la jaro 1923 estas konstatata ke la nombro de laborulinoj en 10 branĉoj de l'industrio pliiĝis relative pli forte ol la nombro de laboruloj. En Svedio la nombro de laborulinoj dum la periodo 1918—1920 kreskis de 61000 ĝis 73000 (proksimume). En Usono dum la periodo 1919—1920 la nombro de laborulinoj ekkreskis de 8910189 ĝis 9024300. Kompare kun 1910 nun la nombro de okupitaj en la produkto virinoj estas kreskinta proksimume je duonmiliono, sed kompare kun la kresko de l'loĝantaro la nombro de laborulinoj malpligrandiĝis pli ol tiu de laboruloj.

Kvankam pri tiu demando ni ne havas sufiĉe solidajn dokumentojn tamen oni povas certagrade konsideri konstatita, ke en neniu lando la virinoj estis forpelitaj el la "konkiritaj" de ili dum la mondmilito branĉoj de l'laboro. En Germanio laŭ la materialoj de profesia komputo de 1907 kaj la raportoj de l'fabrika inspekto por 1920 la nombro de virinoj okupitaj en ĉiuj branĉoj de l'produkto ne esceptante la konstruindustrion, estas forte kreskinta precipe en la metal- kaj maŝinkonstruindustrio. El ĉiuj 100 homoj okupitaj en la produkto estis virinoj.

	1907	1920
En la metalindustrio	6,2	19,1
„ „ maŝinkonstruindustrio	4,8	11,3
„ „ kemiindustrio	16,2	17,9
„ „ teksindustrio	50,0	61,2
„ „ ledajindustrio	9,5	26,2
„ „ lignajindustrio	6,1	12,9
„ „ vestajindustrio	50,7	71,8

En Anglio laŭ la oficialaj materialoj de l'entreprenistaj ligoj 1173000 virinoj okupis dum la milito tiajn oficojn kiuj antaŭe estis okupataj de viroj. Laŭ ĉi materialoj ĉirkaŭ 67000 teksistinoj rekomencis post la milito sian laboron en la koton- kaj teksfabrikoj kaj 30000 faris la samon por la trikfabrikoj. Ĉirkaŭ 195000 virinoj rekomencis sian laboron kiel hejmservistinoj. Sed la granda maso de laborulinoj plenigis la vicojn de senlaboruloj; kiom el ili poste denove eniris en la branĉojn de l'produkto, kie ili antaŭ la milito laboris, ne estas ĝuste konstatebla.

Preskaŭ en ĉiuj militintaj landoj kaj ankaŭ en multaj neŭtralaj ŝtatoj dum la periodo 1913—1919 estis konstatata enmasa alfluo de virinoj en la liberaj profunuiĝoj. Ekzemple en Germanio de 1914 ĝis 1920 la nombro de virinoj profesie organizitaj en la tutgermania ligo de sin-

dikatoj kvinobliĝis kaj la virinoj prezentantaj en 1913 nur 8,9 % de l' organizita laborularo prezentis en 1920 jam 21 % de ĝi. En Aŭstrio la nombro de organizitaj en liberaj profligoj laborulinoj dum la sama periodo sesobliĝis; en 1913 estis nur 10,3 % de profesie organizitaj laborulinoj; en la jaro 1920 jam 23,8 %. En Svisio en la jaro 1920 estis organizitaj trioble pli ol 1913. En Anglio la nombro de organizitaj en amsterdamaj profunuiĝoj virinoj en la periodo 1913—1920 pligrandiĝis de 358 000 ĝis 1 000 000. Vere, ke dum postaj jaroj la kresko ĉie ĉesis. En Anglio kaj Aŭstrio la laborulinoj partoprenas pli aktive ol la viroj en la enmasa forkuro el profunuiĝoj. Tiel ekzemple la anglaj profunuiĝoj perdis dum 1921—1923 ne malpli ol 52 % de siaj membroj-laborulinoj, dum la nombro de membroj-viroj malpliiĝis nur je 0,12 %. En la sekvinta jaro forlasis la organizaĵojn relative malpli da laborulinoj ol da laboruloj, sed la absoluta nombro de eksiĝintaj el profunuiĝoj virinoj estis preskaŭ tiom granda kiel en la pasinta jaro t. e. nome 28,778 aŭ 12,38 %. En Germanio dum la "kritika" jaro 1923 laŭ la statistikaj materialoj de ADGB eksiĝis el profunuiĝoj tiom da virinoj kiom da viroj. Entute, la nombro de virinoj eksiĝintaj sole en tiu-ĉi jaro el profunuiĝoj estas pli alta ol la tuta nombro de organizitaj en la jaro 1913 (en la jaro 1913 la virinoj-anoj estis 290,347 kaj en 1923 el profunuiĝoj eksiĝis 314 688 virinoj).

Sed malgraŭ la forta dum la lastaj jaroj malpliiĝo de l'nombro de profesie organizitaj laborulinoj ĝi tamen estas senkompare pli granda ol antaŭ la milito. Tiel ekzemple en Germanio en la nuna momento estas plio de 1 000 000 organizitaj laborulinoj kaj en Aŭstrio de.160,945 ol en la jaro 1913. Eĉ en Anglio kie la forkuro de virinoj el profunuiĝoj estis relative kaj absolute la plej intensa, tamen en la jaro 1923 ekzistas organizitaj laborulinoj 120 000 pli ol en 1913. Dank' al la porvarba kampanio dum la lasta jaro la nombro de profesie organizitaj laborulinoj denove ekkreskis. Elrusigis *A. Levandovsky, 35.*

El Portugalio

La portugala registaro publikigis dekreton agnoskantan laŭleĝan ekziston de la Naciaj Federaĵoj de laboristaj sindikatoj, de la Lokaj Laboristsindikataj Unioj kaj, konsekvence, de la Ĝenerala Konfederaĵo de l' Laboro. Kvankam la fakto, per si mem, havas nenian gravecon ĝi estas iel instrua.

Ĝis nun, nur la sindikatoj havis, per dekreto datita de la 9a de majo 1891, leĝan ekzistrajton. La federon de tiuj sindikatoj kaj konfederon de la rezultantaj federaĵoj, la portugala leĝaro tute ignoris, kio neniel malpermesis la konstantan plinombriĝon kaj progresan malvolviĝon de tiuj organizaĵoj, kiuj, vivante eksterleĝe, ĉiam normale kaj efike funkciis en sia misio plibonigi la nuntempan laboristan situacion kaj prepari la fortojn por la estonto. Do, la citita dekreto estas nenio pli ol konstato de neforigebla ekzistaĵo.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam la portugala laborista movado ankoraŭ ne estis paŝinta sur la firman kampon de senpera agado, nia centra nacia organizaĵo revendikis, el la tiamaj registaroj, la enleĝigon de la federaj organizaĵoj, kiuj tiam apenaŭ ekvivis kaj havis nenian efektivan forton; ĝi malsukcesis. Nuntempe, kiam la organizita proletaro ne plu atendas ke senvaloraj leĝoj konfirmu konkiritajn kaj jam ĝuatajn rajtojn, la registaro donacas al ni dekreton, kiun ni bezonas por nenio...

Krome, ni konstatu ke jam de longe la oficialuloj agnoskis, ne jure sed fakte, la efektivan ekziston de la priparolitaj federaj organizaĵoj, ĉar kiam iu el ili delegis komisionon por prezenti decidojn aŭ postulojn koncernantajn la oficialajn instituciojn, je la nomo de la respektiva anaro, oni ne rifuzis ĝin konsideri kiel reprezentanton de la deleginta laboristaro. Ĉiam kaj ĉie okazas same: la registaroj ekscias nur tion, kion la popoloj jam forgesis...

Abílio Ribeiro (1504).

La ekonomia stato de laboristoj en Finnlando

Per kelkaj ciferoj elĉerpitaj plejparte el oficiala statistiko mi volas montri la evoluon de la salajra situacio 1913 ĝis 1924 kaj la nunan ekonomian staton de la finna laboristaro. La prisalajra statistiko koncernas segejindustrian laboristaron, sed oni povas ĝin rigardi kiel mezan salajron de ĉiuj gelaboristoj en la lando.

La meza salajro de la segejindustriaj gelaboristoj estis 1913: por viroj fmk. 0,41, por virinoj 0,23, por ambaŭ meznombre 0,38; kaj 1924: 5,79, 2,77 kaj 5,34. (Rim. Pro la pligranda nombro de viraj laboristoj la salajro de ambaŭ ne estas tute meza, sed pli proksima al vira salajro.)

Jena tabelo montras per indikaj nombroj (indeksoj) evoluon de la pohora salajro kompare al la prezoj de vivbezonaĵoj:

Jaro	Indekso de pohora salajro			Indekso de prezoj	Aĉetpovo de pohora salajro
	Viroj	-inoj	gelabor.		
1913	100	100	100	100	100
1923	1320	1121	1310	1147	118,3
1924	1371	1148	1352	1219	122,6

La tabelo montras, ke la pohora salajro de viroj (kaj la meza) kreskis pli kaj tiu de virinoj malpli ol la prezoj de vivbezonaĵoj. Sed samtempe la nombro de monataj laborhoroj malpliiĝis de 223 ĝis 161 kaj tial la monata salajro de ambaŭ seksoj malkreskis jene:

Jaro	Indekso de monata salajro			Indekso de prezoj	Aĉetpovo de monata salajro
	Viroj	-inoj	gelabor.		
1913	100	100	100	100	100
1923	1052	1009	1062	1147	93,9
1924	996	980	1000	1219	88,5

La aĉetpovo de la meza pohora salajro do kreskis je 22.6 procentoj, sed tiu de la monata salajro malpliiĝis je 11.5 procentoj. La nunaj salajroj, precipe de viroj, tre multe varias. Metia laboristo, ekz. masonisto, povas kelkfoje somere ricevi 20 aŭ 30 mk. pohore sed helplaboristoj ne ofte gajnas pli ol 4 aŭ 5 mk.

Se ni taksas 5 fmk. kiel mezan salajron de gelaboristoj, ni povas fari jenan liston, kiu montras, kiom da tempo oni devas labori, por ricevi diversajn vivbezonaĵojn:

1 kg. da bovoviando	2 hor.	—	min.
1 „ „ porkviando	3 „	40	„
1 „ „ butero (bona)	8 „	—	„
1 „ „ margarino	3 „	40	„
1 „ „ sekala pano	— „	45	„
1 „ „ tritika faruno	1 „	10	„
1 litro da lakto	— „	27	„
1 tramvojbileto	— „	9	„
1 paro da ŝuoj (mezkvalita)	30 „	—	„
1 vestaĵo por viroj „	140 „	—	„
1 ĉiutaga ĵurnalo por 1 monato	2 „	—	„

En la jaroj 1920—21 la socia ministrejo aranĝis esploradon de vivkondiĉoj pere de kontolibroj ĉe 437 laboristaj kaj 117 oficistaj familioj en diversaj partoj de la lando. La jarspezoj meznombre estis jenaj: Ĉe laboristaj familioj: enspezoj 16 911,2 fmk., elspezoj 17 428,5, deficito 517,3; ĉe oficistaj familioj: ensp. 34 420,6, elsp. 33 831,6, resto 589.

La elspezoj dividiĝis jene:

	Ĉe laboristoj		Ĉe oficistoj	
Nutraĵoj kaj refreŝigaĵoj	61,2	procentoj	36,8	procentoj
Vestaĵoj	15	„	14	„
Loĝejo (1924 jam 10—20 %)	3,9	„	5,4	„
Varmo kaj lumo	4,4	„	4,7	„
Impostoj, asekuro kaj kotizoj	3,5	„	6,9	„
Aliaj elspezoj	12	„	32,2	„

La impostoj nune estas multe pli pezaj ol la supre notitaj. La komunuma imposto en multaj komunumoj jam estas ĉ. 10 procentoj el la enspezoj, la ŝtata (progresiva 1/3—20 procentoj) por laboristoj 1—3 procentoj, kaj preskaŭ ĉiuj pagas ankoraŭ ekleziajn impostojn, kvankam la nova ekleziliberiga leĝo ebligas liberiĝon je ili.

Je la ekonomia situacio de laboristoj ankaŭ multe efikas senlaboreco, kiu precipe vintre turmentas tiel multajn laboristajn familiojn, sed pri tio mi ne havas nun statistikon.

SAT-ano 2118 en Viipuri.

Senlaboreco en Aŭstrio.

Laŭ oficiala statistiko la nombro de senlaboruloj dum monato novembro 1924 kreskis je 27704, tiel ke la 30. novembro oni nombris entute 115684. Meze de decembro oni jam nombris 130000 senlaborulojn! La rapida kreskado de tiu nombro estas ĉefe kaŭzita de la komenciĝinta vintra periodo, pro kiu malebliĝas daŭrigo de mason- kaj konstrulaboroj. La situo en la vestaĵ-industrio estas tre malfavora, same kiel tiu en la nutraĵ-industrio. Nur la grafika industrio montras pliboniĝon de la situo. Fine de novembro la nombro de senlaboruloj subtenataj en Wien estis 52689 kontraŭ 45220 en la sama monato de l'antaŭa jaro. Okazis ankaŭ, ke kelkaj uzinoj entute ĉesigis la produktadon kaj iliaj laboristoj estas maldungitaj.

F. J.

En Wien la registaro malpermesis grandkunvenon de l'senlaboruloj, kaj 22. 12. la registaro mobilizis milojn da policanoj kontraŭ kelkaj cent senlaboruloj. La policanoj perforte disbatis marŝantajn grupojn. Multaj estas arestitaj, ankaŭ komunistaj gvidantoj. Tiel aspektas la unuiĝeca rajto de l'laboristoj en la tiel ofte priglorata demokrata Aŭstrio!

351, Wien

Estonio

El letero ni eltiras jenajn ciferojn, kiuj komprenigas la okazintaĵojn kaj ekkonigas la malbonan ekonomian situacion de la lando:

Kiel vivadas laboristoj? Regadas akriĝonta senlaboreco. Laŭ oficiala sciigo en komenco de decembro en Reval (Tallinn), kie loĝas entute proksimume 115000 homoj, ĉe laborborso registriĝis proksimume 1300 senlaboruloj (pasintjare proks. 500). Efektive ilia nombro estas du- aŭ triobla. Pri aliaj urboj mankas informoj, sed en ili senlaboreco ne estas malpli akra.

Meza laborista salajro estas 20—25 estonaj markoj por viroj kaj 13—18 mk. por virinoj (1 dolaro = 375 estonaj mk.). La labortago estas oficiale 8 hora, sed la laboristoj estas devigataj labori 9, 10, eĉ pli da horoj tage, por iel ekzisti.

Prezoj de kelkaj vivnecesaĵoj estas:

sekala pano	9—10	e. mk. po funto
butero	115—120	„ „ „ „
porkviando	35—40	„ „ „ „
bovoviando	22—25	„ „ „ „
sukero	22	„ „ „ „
ovo	10—13	„ „ „ „
lakto	18—20	„ „ „ „

botoj ordinaraj 1400 e. mk. po paro

Sennomulo.

TRA LA KLASBATALO

En Albanio la ribeluloj venkis la registarajn trupojn kaj okupis preskaŭ ĉiujn urbojn de la lando. — Jugoslavio pliakrigis sian kontraŭbolŝevistan aktivecon kaj nuligis ĉiujn komercajn interrilatojn kun Sovetio.

Laŭ "Pravda" la balkanaj ŝtatoj interkonsentis, reorganizi en Balkano la fifaman Vrangel-armeon.

La Kolonja zono (Rejnlando), kiu konforme la Versajlan traktaton devas esti liberigata de britaj trupoj 10. januaro, restas (laŭ duonoficialaj komunikoj) okupita. Kruela bato por ĉiuj pacifistaj iluziuloj!

En Japanio fondiĝos politika laborista partio per la penadoj de la Japano-laborista tuta federacio (SAT-rap. Tokio).

En nokto de 23. novembro 1924 ĉirkaŭ 15 socialistoj en Tokio kantis la revolucian kanton, disdonante malpermesitajn gazetojn. Policanoj sukcesis kun helpo de faŝistoj (anoj de societo Kokusui-kai) fine aresti kvar k.dojn. (SAT-rap. Tokio).

RUĜA SPORTO

Unueco de la internacia movado de sporto kaj gimnastiko

Rezolucio de la 3a Kongreso tutmonda de l' Ruĝa Sport-Internacio (RSI)

Kapitalismo devigas la tutan laborklason al konstanta batalo por siaj vivkondiĉoj. Burĝaro celas plenan sklavecon de la laboristaro por pli facile regi ĝin. Laborista klaso devas kompreni, ke ĝia situacio ne povas pliboniĝi sen malaperigo de kapitalismo. Ĉiu iluzio malfortigas lukton de l'proletaro. La diversaj epokoj de demokratismo kaj pacifismo trapasas rapide kaj alvenigas periodojn de pli akraj bataloj. Por la laboristaro kaj kamparanaro subpremitaj povas esti nur unu vero, t. e. la venko de proletaro povas okazi nur sur ruboj de kapitalismo.

La laborista tutmonda sportmovado estas parto de la organizaĵoj de batalklaso. Kontraŭ la streĉita fronto de la kapitalismo, ni devas kontraŭstarigi la firman unuecan fronton de l'proletaro tutmonda.

RSI batalis de la komenco por unueco de l'tutmonda laborista sportmovado; ĝi pruvis tion plurfoje kaj faris ĉion eblan por malhelpi la pordisigan laboron. En Francio, la RSI ne sukcesis malhelpi disigon, oni disigis la movadon perforte kaj konscie. Nia 3a kongreso konstatas aliflanke ke en Ĉekoslovakio (germanaj regionoj) unuecon oni konservis nur pro forta agado de l'amasoj kontraŭ kelkaj gvidantoj. Ankaŭ pro tiu agado RSI partoprenis feston en Karlsbad.

Organizo de la unua olimpiado laborista sen RSI kaj sen Sovetio markas klasikan agon kontraŭ unueca fronto.

RSI proponis plurfoje ke la unua tiu olimpiado estu organizata sur bazo de impona unueca fronto kontraŭ burĝaro, kontraŭ burĝa olimpiado en Parizo. Sed iaj gvidantoj de l'laborista sportmovado volas malhelpi ke revoluciaj sportaj flagoj disfaldiĝu. Ĉe tiu demokratio, ili volas malhelpi ke la reprezentantoj de l'unua proleta ŝtato, de Sovetio, partoprenu ĝin.

Malgraŭ pordisigaj alvokoj, kalumnioj kaj propagando kontraŭsoveta, la RSI opinias ke la unua laborista olimpiado devas marki la unuecan fronton de la sportlaboristaro tutmonda kaj invitas la amasojn subteni ĉiumaniere tiun signalvorton. Agado devas esti rapide kondukita se ni volas ke RSI povu plenplene partopreni olimpiadon, ĝi eĉ devas jam partopreni ĉe la porpreparaj vintraj konkursoj.

Ju pli grava estos la danĝero de disigo en nia movado, des pli energie la amasoj batalu por unueca fronto sur bazo de klasbatalo. Neniu ano de RSI devas forlasi sian organizajon.

Por unueco, por komuna organizo de l' unua laborista olimpiado.
Kontraŭ disigo kaj fuŝuloj de l' laborista sportmovado.
Kontraŭ la burĝaj sportorganizaĵoj kaj iliaj kunhelpuloj.
Kontraŭ la imperialistaj militoj kaj faŝismo.
Por la klasbatalo, por la venko de l' laborista klaso.

Jen ti-kion proklamas la 3a Kongreso tutmonda de l'Ruĝa Internacio de Sporto, jen kio estas ĝia firma kaj nedeflankebla decido.

Moskvo, Oktobro 1924.

La 3a Kongreso tutmonda de RSI.

Manifesto

Al laboristaj sportuloj el ĉiuj landoj!
Al gelaboristoj de la urboj kaj kamparo!

Je la nomo de la delegitoj el 21 landoj, la 3a kongreso tutmonda de la Ruĝa Internacio de Sporto (RSI) alvokas ĉiujn laboristojn, anojn de sportaj aŭ gimnastikaj organizaĵoj, aniĝi al proleta kaj kamparana Internacio de Sporto.

Burĝaro agas ĉiumaniere por daŭrigi sian regadon sur la subpremitaj klasoj. Je la manoj de l'burĝaro, la sportorganizaĵoj fariĝas iloj de l'burĝa militarismo kaj faŝismo, kaj tiel batalkadroj de l'reakcio kontraŭ la proletaro de sia propra lando.

La burĝaro komprenis bone la gravecon de sportaj organizaĵoj, pere de kiuj ĝi koruptas la proletaron (sportaj asocioj en fabrikejoj, militpreparo de l'junularo, naciistaj kaj ŝovinistaj asocioj ktp.).

El rimedo de burĝaro en klasbatalo kontraŭ proletaro, la proletaj sportorganizaĵoj devas fariĝi grava faktoro por la proletaro kaj malriĉa kamparanaro en ilia tutmonda batalo por starigo

de proleta socio. En atmosfero de batalklaso, ne povas esti por laboristoj "neŭtralismo" kaj "senpolitikeco", tiel ankaŭ rilate al gimnastiko aŭ sporto. Kunlaboro aŭ socia harmonio kun burĝaj organizaĵoj estas perfido je proletaj interesoj.

Proletaro iras al gravaj luktoj kaj la 3a kongreso de RSI proklamas laŭtege la neceson por la proletoj organizi klasbatalon ankaŭ ĉe kampo de sporto kaj tute foriĝi de organizaĵoj kaj idealo burĝaj.

La "unueca fronto" de ĉiuj proletoj, kiel bazo de nia sporta movado, plifortigos la tutan fronton laboristan kaj kamparanan por venki kapitalistan mondon. Ĉi-kiuj fuŝas tiun unuecan fronton, fakte celas detrui unuecon de la proletaj organizaĵoj kaj konsekvence subtenas kapitalismon.

Ĝis nun ne povis okazi vera laborista olimpiado, ĉar por tiu de Frankfurt/Main oni rifuzis inviti revoluciajn sportorganizaĵojn, oni rifuzis ekrilati kun proletaj sportorganizaĵoj de Sovetio, oni rifuzis interrilati por unuigi la laboristajn sportinternaciojn. Sed la gelaboristaro tutmonda firme alcelas unuecon kaj ne permesos disigon de siaj organizaĵoj.

Gelaboristoj sportistaj, la RSI vin alvokas: Ekleviĝu kaj protestu energie kontraŭ fuŝado de unueca fronto, sciigu ĉie ke sen partopreno de RSI ne devas okazi olimpiado.

Ĉe nia 3a tutmonda kongreso kunvenis delegitoj el preskaŭ ĉiuj partoj de l'mondo, mankis nur reprezentantoj de orientaj kaj koloniaj popoloj; tiuj popoloj jam komencis sian liberigontan batalon, kaj nia kongreso petas, ke revoluciaj sportorganizaĵoj sin starigu en tiuj landoj. Tiel same, la proletoj de Anglio kaj Nordameriko devas krei amasajn sportlaboristajn organizaĵojn.

Gelaboristoj, proletaj gesportuloj! Se gvidantoj forĵetas viajn petojn por unueco, vi devas agi ĉiumaniere por starigi imponan, ruĝan olimpiadon. La RSI invitas ĉiujn proletajn organizaĵojn de sporto el tutmondo, samkiel ĉiujn proletajn organizaĵojn partopreni la unuan tutmondan spartakadon.

Ruĝa Spartakado signifos solidarecon de l'internacia proletaro kontraŭ la burĝaro; ĝi markos novan etapon en epoko de sporta proleta movado ne nur en Eŭropo aŭ Ameriko, sed ankaŭ ĉe orientaj kaj koloniaj subpremataj popoloj.

Vivu la batalo kontraŭ la burĝaj sportorganizaĵoj, kontraŭ la militarismo kaj faŝismo!

Vivu la fizika edukado kiel ilo de l'klasbatalo!

Vivu sana, proleta sporto kaj unueco de proleta sportmovado!

Vivu la unua tutmonda proleta olimpiado, la unua tutmonda proleta spartakado!

Vivu internacia solidareco, komuna batalo ĉe vicoj de laborista revolucia movado por liberigo de l'laborista klaso el la kapitalista jugo!

Vivu la Ruĝa Sport-Internacio!

Je la nomo kaj pro ordo de 3a Kongreso tutmonda de RSI
Prezidantaro de E. K. de RSI

Moskvo, Novembro 1924

KRONIKO

Francio. *Lyon.* La 20an de dec. lastjara okazis ĝenerala kunveno de la Laborista Esp. Grupo, en la sidejo. Ĉeestis 27 k.doj. Notinde estas ke de longe ne venis tiom da k.doj en niaj kunvenoj. El la raporto de l'sekretario ni konstatas, ke nun funkcias 6 kursoj kiujn sekvas regule kaj studeme 30 lernantoj (Ili lernas jam la 10an lecionon!) Estis decidite: 1e ĉiumonate okazos ĉu perpraktika kunveno kun paroladeto en esp. ĉu propaganda kunveno por varbi esp.istojn en la popolamasoj; 2e en la gravaj publikaj mitingoj ni aranĝos broŝurvendadon kaj komisios k.don por tribune atenti la laboristaron pri esp; 3e cirkuleron oni sendos al ĉiuj lab. organizajoj atentigante ilin pri la graveco kaj la utileco de intern. lingvo por proletaro, por ke ili organizu specialan kunvenon kun parolado de esp.ta k.do, kiu klarigos nian movadon, por ke ili konsilu la lernon de esp. kaj por ke ili helpu nin; 4e informa bulteno estos eldonata per multobligilo kaj sendata al ĉiuj sindikatoj kaj lab. organizaĵoj. Tiu Bulteno enhavos nur tradukojn el artikoloj aperintaj en "Senn." aŭ en aliaj antaŭenemaj esp. gazetoj kaj el dokumentoj faritaj de seriozaj k.doj. Tiel ni montros ke esp. utilas al laboristaro. La ĉefa decido estis jena: la grupo akceptas organizi la kongreson de Lab. Esp. Franclingva Federacio en 1925. La kongresontoj povas jam rilatiĝi kun k.do Marcel Roux, 90 rue Boileau, *Lyon.*

Ĉiulunde, kunveno por administraj aferoj kaj "Esperanta Kroniko". Sabaton 17an de januaro, monata kunveno. Multaj venu! La sekretario: *Marcel Roux.*

Polio. *Varsovio.* Ĉe la profesia asocio de komerc- kaj kontoroficistoj (str. Zielna 25) fondiĝis rondo esp.a "Progreso". K.do Koss dum la inaŭgura kunveno faris paroladon pri "La profesia movado de l'intelekt-laboristoj kaj E.". Samtempe la rondo organizis kursojn sub gvido de k.do Bronstein. 20 p. 3. 1. komenciĝos kurso de k.do Koss." Glos Pracowniczy" (Katowice) of. org. de supra profunuiĝo malfermis konstantan esp. fakon. *Br.*

Sovetio. *Leningrado.* Esp. rondoj funkcias ĉe Domo de Proletaria Kulturo, Klubo de Leningrada Milico, Lgr. Gubernia Laborfako kaj Domo de Medicina Laboranto. Ĉiuj gvidantoj de rondoj, krom la lasta, estas pagataj. Lekcioj pri esp. okazis lastatempe en Klubo de Baltaj Maristoj (ĉirkaŭ 450 pers.) kaj Gub. Laborfako. *G. T.*

Leningrada Societo de Esperantistoj-Blinduloj "Amikaro" (adreso: Pesoĉnaja ul. 39) eldonis per brajla reliefa skribo la plenan esp. lernolibron de Devjatnin, por rusoj-blinduloj. La lernolibro enhavas 67 ambaŭflanke presitajn foliojn grandformatajn.

Ĵlobin. Centro de nia laboro estas fervojlaborista klubo je nomo "Oktobra Revolucio". 7. 12. k.do Miĥajlov faris raporton pri esp. k. ĝia signifo por homaro kaj lab. movado. Ĉeestis pli ol 200 p. Multaj deziras lerni. Kursoj estas aranĝitaj. *(4026).*

Tver. 14. 12. okazis ĝenerala kunveno de Tvera organizaĵo de SEU. Post prelego pri D.ro Zamenhof, pro datreveno, la kunveno auskultis raporton de k.do Varankin pri la okmonata agado de gub. kom. de SEU, kiu rezultigis bonajn sukcesojn ĉe multaj oficialaj institucioj. La loka gazeto "Tverskaja pravda" presigis dum 8½ monatoj 80 artikolojn pri esp. k. tradukojn de esp. plejparte el SR. kaj Senn. Oni ankaŭ organizis instituton de esp. korespondantoj, kiuj prilaboras artikolojn por loka gazeto kaj Senn. Multaj esp. ĉeloj kaj fakoj funkcias. SAT-grupo i. a. estas organizota.

Oficiala akcepto de esperanto

La partikongreso de "Germana socialdemokrata partio de Polio" en Bielsk (Bielitz), Pola Silezio, okazinta 7. kaj 8. dec. akceptis *unuanime* post raporto de la parlamenta deputito k.do Pankratz pri esp. k. ĝia signifo por la socialismo jenan rezolucion:

"*Konsiderante la gravecon de facile ellernebla internacia neŭtrala lingvo kiel komprenilo por la intern. proletariaro, kiu ne povas okupiĝi pri longjara kaj multekosta studado de lingvoj — la IIa partikongreso de la Germ. Socialdemokrata Partio de Polio rekomendas al siaj membroj la studadon de lingvo esperanto, disvastiĝinta jam tra ĉiuj landoj kaj alvokas al la aliaj socialistaj partioj labori en la sama senco.*"

Delegitoj de div. urboj petis tuj poste pri esp. instruado kaj organizado de esp. sekcioj socialistaj.

En Bydgoszcz (Bromberg) okazas dufoje ĉiusemajne esp. laborista kurso vizitata de 25 p. *Pola Esp. Servo Bydgoszcz.*

Metodoj por utiligi esperanton

Ĉiuj kredeble scias, ke la rusaj gazetoj diferencas de la kapitalistaj precipe pro sia masa karaktero, ĝuste pro tio ke ili estas efektive laboristaj gazetoj, ke ilin partoprenas ne sole specialistoj-ĵurnalistoj, sed ankaŭ mem laboristoj — t. n. laboristaj korespondantoj (rabkor.).

Do Tvera SEU-organizaĵo kreis novan specon de lab. korespondanto — esperkor'on — esperantan korespondanton. Tiu ĉi "esperkoro" devas skribi pri vivo de esp. ĉelo ĉe sia fabriko por div. rusaj kaj esp. gazetoj, skribi tradukojn el Senn. kaj tradukojn de eksterlandaj leteroj por sovetaj gazetoj kaj murgazetoj ĉe sia entrepreno, kaj skribi pri laboro de rusa laboristo por Senn. "Esperkoro" devas esti vera intern. lab. korespondanto. Ŝajnas al ni, ke "Sennaciulo" multe gajnus per tio, ke la gvidorganoj proponus cirkulere al ĉiuj SAT-grupoj, elekti specialan "esperkoron". *V. Varankin.*

Baloto pri nova Direkta Komitato

3a listo de Kandidatoj kiel ordinara D. K.-ano:

por la 5a sektoro: K.do Petersen, Hans, Moselstr. 18, *Köln a. Rh.*
" " 6a " K.do Muribo, Martin, Bekkelagshögda, *Kristiania.*
" " 14a " K.do Fukuta, Kunitaro, Kyodo Kasai Hoken Kaisha. Umedashinmichi, *Osaka.*

(La distanco inter Osaka kaj Paris kaŭzas tion, ke ĝis nun ni ne ricevis respondon de K.do Fukuta pri lia kandidateco al la nova D. K.; tamen ni enlistigas lian nomon, ĉar liaj lastaj leteroj permesas la certecon ke li bonvole daŭrigus sian oficon de D. K.-ano.)

Ohe! Satanoj!! Kiuj aspiras al ofico de D. K.-ano? — Informu nin senprokraste. Faru tion, ke ĉiu SAT-sektoro havu reprezentanton en la Direkta Komitato.

La legantaro pri "Sennaciulo"

"Pri formo kaj enhavo de S. mi estas tre kontenta. Kiel tre legindaj mi precipe ŝatas la ĉefartikolojn. La kapo de S. tute ne plaĉas al mi, la titolo estas bona, sed la cetero ne efikas bone . . . " *Friedr. Mayer, Mülheim-Ruhr.*

"La formo por semajna presaĵo estas sufiĉe bona kaj oportuna. La enhavo estas por mi plejparte ne interesa. Plejmulto da artikoloj apartenas al miaj samlandanoj, estas tradukoj el rusaj gazetoj. Certe, mi komprenas, ke la sama enhavo povas esti tre interesa por laboristoj de aliaj landoj. Mi opinias tute malnecesa la fakon "Recenzejo" . . ." *V. Ivanov, Gomel.*

"Mi estas kontenta pri formo kaj eksteraĵo. Nenion mi trovas neleginda." *Marko Uccelli, Milano.*

"Pri formo kaj eksteraĵo mi estas kontenta. Nenio estas superflua el la enhavo." *Alois Fink, Tamsweg.*

"Tre plaĉas al mi formato kaj enhavo de S. Kun plej granda intereso mi legas art. pri laborista vivo kaj ankaŭ "Dek jarojn en P." . . ." *J. Tambak, Kohila, Estonio.*

"Pri la formo mi estas kontenta, sed ne pri la surskribo . . Kun plej granda intereso mi legas la "kronikon" . . ." *F. Bauer, Gablonz.*

"Pri formo kaj eksteraĵo mi estas preskaŭ kontenta. Nur super la titolo mankas la ĝenerala frazo: Proletarioj el ĉiuj landoj unuiĝu! . . . Superflua mi opinias: Idealo en revolucio (longa kaj neinteresa), Soveta respubliko kiel polit. formo de prol. dikt, La Kavaliroj de Verda Stelo, Promenoj kaj promenetoj . . . estas ie tro akraj." *J. Dagys, Birzai, Lit.*

"Pri S. mi estas tre kontenta; ĝi estas mia ĉiusemajna interligilo kun tutmonda proletaro. K.don Roth mi kontraŭas. Ĉu la kliŝo faras gazeton? mi pensas ke ne. La enhavo estas la ĉefa." *Ludwig, Dörfel.*

"Formo kaj eksteraĵo estas kontentigaj. Ĉio estas samgrade interesa, krom polemikoj pri ŝakludo, filatelio kaj aliaj ne pure proletaj distriĝoj." *E. Cuillerdier, Rouen.*

KORESPONDEJO

Prez. de S.E.U. (Moskvo). La fakto, ke la XVIIa esp. kongreso okazos en Svisio neniel ĝenas la SAT-anojn, ĉar ili ne kutimas partopreni la burĝajn esp. kongresojn. Sekve, via protesto kontraŭ la okazigo de la t. n. neŭtrala universala kongreso esp. en Svisio neniel povas interesi nian legantaron. *E. L.*

Al lingvo-diskutemuloj. Lastatempe ni amase ricevis lingvajn proponojn k. studojn. Kvankam ili plejparte estas tute diskutindaj, ni tute ne povas grandskale trakti tiujn temojn en nia gazeto. Ni rekomendas la koncernulojn, sin turni en tiaj aferoj al kdo. M. Krjukov laŭ la alvoko en no. 14 sub "Lingvaj studoj", kiu prilaboros la lingvan fakon de nia gazeto. Ĉi-okaze ni deziras konigi al niaj kunlaborantoj, ke ni, lojalaj al la decido de nia lasta kongreso, en kiu tre konvinke estas pledita pri la lingvo en niaj gazetoj, — ne konsentos en S. la uzon de la formoj "ante, anke" k. s. *Red.*

300. Via artikolo aperos baldaŭ. — *N. B.*

RECENZEJO

Gazetoj.

Represis artikolojn. *Drapeau Rouge,* Bruxelles, 16. 12., Nuna stato de sveda lab. (S. 8). *Le Libertaire,* Paris, N.o 363, Ekonomiaj informoj pri Rusio (S. 3).

Enpresis notojn kaj div. art.: *News Service,* Berlin (Fritz Kater), porgazetara servo n.o 1 (15. 11.), tute en esp. *Il Sindacate Rosso,* Milano, n.o 41 (13. 12.). *Le Cri des Jeunes,* St. Etienne 1. 11. *Technische Union,* Wien, 14. 12.

Eĉ la ofero de l' vivo povas esti, iaokaze, iu ekspansio de l' vivo, fariĝinta sufiĉe intensa por preferi sekundon da noblega ekzaltiĝo ol jarojn da vulgara vivado. M. Guyau

Fragmentoj el "Dek jarojn en Persio"

14) *E. Rebrik*

Jam kelkajn jarojn en Gilan organiziĝis revolucia komitato kun nacia programo tre malproksima de socialismo entute, tiom pli de komunismo. Nomo de tiu ĉi organizaĵo estis "dĵengeli"[1]) t. e. arbara, ĉar ĉefo kaj anoj loĝis kaj efikis en gilanaj virgaj arbaroj. Ĉefo de tiu ĉi revolucia unuiĝo estis Kuĉik-han[2]); kaj liaj amikoj — helpantoj: Ehsanulla-han, doktoro Hiŝmet, Halu-Kurban formis la centran komitaton de "dĵengeli".

Unua kaj ĉefa problemo en programo de "dĵengeli" estis nacia liberigo de Iran kaj poste batalo kontraŭ feudala regnordo. Unuafoje "dĵengeli" ekprovis siajn fortojn kontraŭ rusaj kozakoj, kiuj en tempo de mondmilito eniris Persion. Tamen la fortoj de "dĵengeli" estis tiam ankoraŭ tre malgrandaj, kaj certe ili ne povis sukcese batali kontraŭ rusa armeo.

En komenco de jaro 1918 rusa armeo jam tute sendiscipline forlasis Persion. Municio, pafilaro, aŭtomobiloj kaj alia milita aĵaro estis forlasita aŭ vendita de soldatoj mem kaj plej granda parto de artilerio kaj obusoj transiris en manojn de Kuĉik-Hano.

En tiu ĉi tempo vivaj fortoj de Kuĉik-Hano jam plifortiĝis kun helpo de rusaj revoluciaj organizaĵoj en Persio. Ekzemple milit-revolucia komitato en Enzeli ĉiam havis ligilon kun stabejo de Kuĉik-Hano kaj multe lin helpis.

Mi jam antaŭe diris, ke kvankam Persio ne partoprenis mondmiliton, sed ĝi vidis sur sia teritorio diversnaciajn armeojn. Tiel ankaŭ okazis en Gilano. Post foriro de rusarmeo el Persio ĝian lokon okupis anglaj kaj koloraj hindaj taĉmentoj alvenintaj el Mezopotamio. Por naciista Kuĉik-Hano angloj estis samaj malamikoj, kiel rusoj kaj certe li daŭrigis sian batalon kontraŭ ili. En tiu ĉi tempo persa registaro ankaŭ komprenis danĝeron, kiun prezentas en sia persono Kuĉik-Hano kaj sendis siajn kozakojn sub ĉefkomandado de rusaj oficiroj-instruktoroj. Jaroj 1918 kaj 1919 pasas en tiu ĉi batalado inter "dĵengeli" je unu flanko kaj ŝahkozakoj kune kun angloj je alia. Fortoj estis neegalaj, sed kelkfoje Kuĉik-Hano sukcesis forpeli siajn rivalojn el Reŝt kaj Enzeli, kie estis starigataj liaj komisaroj.

1) komparu anglan: "jungle" (esp. ĝangalo). 2) laŭvorte: malgranda hano.

Tamen batalado kontraŭ organizitaj fortoj de ŝaha registaro kaj angloj treege malfortigis Kuĉik-Hanon kaj en komenco de 1920 li jam estis preta ekpaciĝi kun registaro, kiam ventega ondo de rusa revolucia movado alruliĝis ĝis bordoj de Persio kaj en persono de bolŝevikoj Kuĉik-Hano trovis por si helpilon.

Jen kia estis ĉefa preteksto por bolŝevika okupado de Enzel, kaj Reŝt: — doni subtenon al persa revolucia movado, kies gvidanto estis Kuĉik-Hano kaj, povas esti, sub formo de tiu ĉi helpo enkonduki Persion komunisman reĝimon kaj socialan revolucion. Mi jam diris en 6a ĉapitro ke ankoraŭ ne venis tempo por sociala revolucio en Persio. Irano sklavigita de "mudjtehidoj", "ahundoj", kaj "mollaoj"[1]) atendas sian Lutheron kaj reformacion. Post kelkaj monatoj tion, ŝajnas, komprenis estroj kaj ĉefoj de bolŝevikoj; ili komprenis, ke en Persio, kie ekzistas nek granda fabrikaĵa industrio nek granda agrikulturo, kie nomada loĝantaro okupas grandegan teritorion, en Persio, mi ripetas, ne ekzistas, eĉ oni ne konas ankoraŭ tian klasan disdividon kiel en Eŭropo, kaj komunisma percepto estas ankoraŭ tute fremda al perso.

Post okupado de Gilan, utiligante konfuzon de registaro, Kuĉik-Hano kaj liaj helpantoj trovis utila sin liberigi de kelkaj kozakaj taĉmentoj, kiuj restis ankoraŭ en Gilan. Unu tagon kozakaj kazernoj en Reŝt estis ĉirkaŭitaj de rusaj ŝipanoj, kaj al kozakoj estis donita ultimato: kapitulaci, transdoni batalilaron kaj eniri servon ĉe Kuĉik-Hano. Kozakoj rifuzis kaj faris kontraŭstaron, sed post ne longa bataleto ili estis venkitaj de pli grandnombra rivalo kaj kapitulacis. Plej granda parto eniris poste ruĝarmeon.

Poste venis vico de kontribucioj kaj konfiskoj ĉe burĝaro. Sed tiu ĉi intenco elvokis proteston je flanko de Kuĉik-Hano kaj kelkaj liaj moderaj amikoj. Iom post iom Kuĉik-Hano komencis kompreni, ke lia nacia programo tute diferencas de ideoj kaj taktiko de komunismo. Sed ne dezirante disŝiri rilatojn kun komunistoj li cedis kaj faris kelkfoje kompromisojn. Anstataŭ ĝenerala konfiskado li konsentis postuli kontribucion nur ĉe la plej riĉaj komercistoj de Reŝt kaj Enzeli. Cetere li mem bezonis monon por provizumo de sia armeo, kaj kontribucio donis al li rimedon ĝin trovi. (Daŭrigota)

1) mahometanaj spiritpastroj.

Sennacieca Asocio Tutmonda

Asocia Sideio: 23 Rue Boyer, Paris-XXe
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-Stött.
poŝtĉeka n.ro 6835

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

Municio por SAT kaj ĝiaj organoj

Aŭstrio: K.dino Berger-Wien, 50000 kr. **Ĉekoslovakio:** Ludwig-Dörfel, 5 kr. ĉ.; Kantor-Karvina, 10 kr. ĉ. **Francio:** Dechambre-Clermont, 5 fr.; 1370 — 20 fr.; Ulo, Paris, 2 fr.; Delacroix-Paris, 10 fr.; Salan-Nîmes, 5 fr.; Kristafor-Buire, 3 fr.; Nicolle-Semur, 3 fr. **Germanio:** Riese-Leipzig 0,70 mk. **Holando:** Verschoof-Hoek, 5 hfl. **Jugoslavio:** Nikŝiĉ, Mlaĉ, Takaĉ, Magiĉ, Jankoviĉ, po 10 din. (ĉiuj en Zagreb). **Portugalio:** Pinheiro-Porto, 4 esk. **Sovet-Unio:** Savĉin-Pokrovsko, 1 rbl.; Nedzelski, Kremenĉug, 0,25 r.; Maslenko-Brjansk, 0,50 r.; Usolcev, Trofimov, Faddev-Ĉita, po 0,70 r. **Svedio:** Johansson-Eksjö, 1,70 kr. sv. **Usono:** Marchevsky-Detroit, 1,20 dol.; Kerr-Denver, 1,79 gmk.

ELDONA FAKO

Multaj gravaj sciigoj de nia fako: La unuaj akcioj de nia kooperativo cirkulas jam en la mondo! Diversaj bonvoluloj, fervoraj, helpemaj k.doj donis sian libervolan kotizon, por helpi nian entreprenon. Efektive ja la akciuloj havas suficajn oportunaĵojn per akiro de niaj biletoj. Niaj akcioj ne estas influataj de kurzfalo, ili ĉiam valoras kontantan monon interrilate kun SAT-administracio. Viajn librojn, viajn kotizojn, viajn abonojn, viajn insignojn vi povas ĉiutempe pagi per la simplaj malpezaj paperetoj perletere sendataj. Se vi havas ian ŝparaĵon, ne metu ĝin je servo de iu kapitalista ŝparkaso! Ankaŭ nia kooperativo garantias al vi rentumiĝon validan tuj kiam vi posedas *unu* jaron vian akcion. Se vi fariĝos senlabora iutempe kaj vi posedas niajn akciojn, jen — vi ne bezonas timi interrompon de membreco aŭ abonoj, pagante vian ŝuldon per la akcio! Do — provizu vin je nia SAT-mono! Al ni vi tiamaniere ebligas pli viglan libro-eldonadon!

Jus aperis la unua verketo de la fako „Moderna Scienco" kun titolo "El la mondbildo de l'nova fiziko" (legu detalojn en la anonco de ĉi-numero). — Kaj nun? Multaj k.doj atendas novajn kaj novajn librojn magie elsorĉotajn de la eldonejo. Jes, la abundo de manuskriptoj atendantaj ĉe ni, pravigus ilian esperon. Se nia aparato financa funkcios bone, vi certe vidus ilin presitaj, almarŝantaj sur la mondtribunon: la *duan* parton de nia legolibro "Ni Legu", kies unua trovis tiom da amikoj en la mondo, la plej novan verkon de U. Sinclair, ankoraŭ ne aperintan entute en libroformo, kies tradukon urĝe prizorgas k.do *Fröding* en Rockford: "Mamonarto", kiun ni tre volonte prezentus tute freŝe al niaj k.doj. Krome ni sciigu (por ke ne aliaj faru la saman tradukon), ke k.do n.o 3712 estas tradukonta el angla la libron "Skizo de Ekonomia Geografio". K.do Behrendt-Essen tradukas el germana la rakonton de Franz Jung: Arbeitsfriede (laborpaco). K.do Gringauz-Bern (adreso: "hauptpostlagernd. Bern-Svisio") preparas libron pri la vivo kaj scienca estiĝo de la 1919 mortinta rusa ekonomisto M. J. Tugan-Baranowsky kaj petas ĉiujn k.dojn, precipe la rusajn kaj germanajn, sciigi al li pri ĉiaj gazetaj kaj jurnalaj artikoloj, aperintaj post 1914 en rusa aŭ germ. lingvo pritraktantaj Tugan-Baranowsky. Nun ni direktas ankoraŭ specialan vokon

Al la anarkistoj!

Ni posedas bonegan manuskripton de verko — ĝis nun neeldonita nacilingve — de P. Kropotkin: "La Etiko", kiun ni tre deziras eldoni. Sed la eldonado de ĉ. 210 paĝa libro kostas nun ĉ. 1200 markojn kaj ni nur disponas pri ĉ. 250 mk. g. (disponigo de SAT-kaso plus fr. fr. 314 + 50 din. serb. kolektitaj de anarkistaj k.doj por tiu speciala eldono). Sekve necesas, ke la k.doj (ĉu anarkistaj, ĉu sindikatistaj, ĉu komunistaj — ja tiu verko povas interesi ĉiujn) kolektu monon por kiel eble plej baldaŭ ebligi la eldonon de tiu grava kaj koninda verko.

Eldona Fako Kooperativa de SAT.

Atentu komunikon de E. K. sur paĝo 6

Ĵus aperas januara kajero de

SENNACIECA REVUO

Monata organo de S.A.T.

Literaturo — Scienco — Pedagogio

EL LA ENHAVO:

MAX DORTU: Noktlaboro. Vers. Trad. G. k. J. Schlittmann. — *A. VASILJEV:* Venĝantulino. Trad. A. Levandovski. — *P. KROPOTKIN:* Ankaŭ ili estis por anarkio. Trad. 1632. — *L. IVN:* La ponto. — *N. BARTHELMESS:* Mano via, cerbo mia... Vers. — *SEB. FAURE:* La revolucio eksplodas! Trad. Moreno. — *N. KRASSOVSKI:* Knut Hamsun (2). — *ROSA LUXEMBURG:* Resumo de la Marx'a Kapitalo (3). Trad. L. Revo. — *G. PIETSCH:* Impresoj de la fervojteknika ekspozicio. — *J. ZILBERFARB:* Sur la vojo al scienca edukado (2).

JARABONO

Argentinio 3 pesos; Aŭstrio 35000 kr.; Belgio 12 fr.; Brazilo 6 milr.: Britio 60 penc.: Bulgario 80 lev.; Ĉekoslovakio 25 kr.; Danio 5 kr.; Estonio 250 mk.; Finnlando 30 mk.; Francio 10 fr. fr.; Germanio 2,50 mk. or.; Hispanio 6 peset.: Hungario 2,50 kr. or.; Italio 12 lir.; Japanio 2 jen.; Jugoslavio 50 din.; Latvio 3,50 lat.; Litovio 5 lid.; Nederlando 3 guld.; Norvegio 7 kr.; Polio 2,50 zlot.; Portugalio 15 esk.; Rumanio 120 lej.; Rusio 1,25 rubl.; Svedio 3 kr.; Svisio 5 fr.; Usono 1,50 dol.

ADMINISTRACIO DE S.A.T.

ESPERANTIO

monata 16-paĝa enhavriĉa kaj bonege ilustrita esper. revuo por socia kaj arta vivo, literaturo, scienco, sporto, filatelio, humoro ktp. — 10 numeroj kostas 4.— ormk., 5.— sv. fr., 1 dol. aŭ egalvaloro. — **P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18.**

Tute aktuala!

SCIENCA-TEKNIKA VERKO APERIS ĈE S.A.T.

D.ro Reiche

El la mondbildo de l' nova fiziko

1. Modernaj konsideroj pri energio kaj radiado.
2. La elektra strukturo de l' materio.

Trad. Herbert Muravkin

Tute populara priskribo de gravaj modernaj problemoj.

52 paĝoj. Kutima formato.

Prezo por bonval. landoj: 0,80 sv. fr., por malbonvalutaj landoj: 0.40 mk. — SAT-anoj havas la kutiman rabaton.

Administracio de S. A. T.

Jarabono: **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej.; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ 1/4 jare abonebla.**

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG